

LA JUNIA VIVO



REDAKCIO KAJ
ADMINISTRADO:
WEST-GRAFTDIJK
(N.H.) NEDERLANDO
GIRONUMERO 209354 NEDERL.

JARABONO:
NEDERLANDO:
0,80 GULDENO
ALIAJ LANDOJ:
16 FR.FR; 0,70 DOL; 2,15V.FR.

MONATA ORGANO POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

Por progresintoj.

KIOM DA TERO PAKOME DEZIRIS.

Pakome, rusa kamparano, per granda ŝparemo kaj streĉa fervoro kontentigis longjaran deziron : li fariĝis terposedanto ! La tero, kiun li de nun kulturis kaj prisemis, estis lia tero, lia propra tero ; sur propra tero li falĉis sian fojnon, sur liaj herbejoj paŝtigis la propraj brutaroj.

Li multe ĝojis, plugante siajn proprajn kampojn kaj vidante la kreskadon de la greno kaj herbo ! La herbejoj kaj la floroj tutalie aspektis ol antaŭe. Pakome sentis sin tre feliĉa.

En iu vespero venis fremdulo en lian domon, kiu rakontis pri malproksima regiono ĉe la bordoj de la Volga, kie la tero estas tre malkara kaj tre fruktodona. La sekalo kreskas ĝis super la ĉevaloj kaj kvin plenmanoj da spikoj sufiĉas por fari grandan garbon. Multaj malriĉaj homoj, posedantaj nur la du brakojn, fariĝis tie en mal-longa tempo, posedantoj de kvindek hektaroj da bonaj gren-kampoj kaj ne malofte oni ricevis 5000 rublojn jare por la tritiko.

Pri tiu ĉi novaĵo Pakome tuj entuziasmiĝis. „Kial mi vivus mizere ĉi tie, se povas esti pli facile tie ?” li pensis. „Mi povas vendi la domon kaj la kampojn, kaj per la mono min bone aranĝi tie. Ĉiu-okaze mi konvinkiĝos per miaj propraj okuloj.”

Kiam la somero venis, li preparis sin por la vojaĝo. Sur vapor-ŝipo li malsupreniris laŭ la Volga ĝis Somara, vojaĝis ankoraŭ dudek verstojn plue kaj fine atingis la celon de sia vojaĝo.

Li trovis ĉion laŭ la rakonto. La muĵikoj (kamparanoj) vivis ĉi tie sufiĉe lukse. La loĝantoj akceptis la fremdulojn kun granda komplezo kaj donis al ĉiu, kiu volis resti, dek desjatinojn (1 des-jatino = 1,0925 hektaroj) da kulturgrundo. Kaj kiu havis monon, povis laŭ deziro aĉeti je tri rubloj por desjatino. Kun tiuj sciigoj

Pakome vojaĝis hejmen. Li vendis por bona sumo siajn kampojn, la domon kaj la brutarojn kaj en la printempo li foriris kun la tuta familio al la nova regiono.

* * *

Pakome ekloĝis en granda vilaĝo kaj baldaŭ amike rilatis kun la diversaj loĝantoj. Oni bone akceptis lin kaj per malgranda sumo li ekposedis kvindek desjatinojn da tero, kun la rajto paŝti sian brutaron sur la komunaj paŝtejoj. Li konstruigis domon por si kaj aĉetis bovinojn kaj ĉevalojn; sekve li estis kun la multa grundo duoble pli riĉa ol antaŭe. Kaj tre fruktodona estis ĉi tie ! Li sentis sin dekoble pli feliĉa.

Tiel estis al li en la unuaj monatoj, sed kiam la ĉarmo de la noveco estis for, li ekhavis alian opinion. Li volis semi tritikon, sed la fekundaj grenkampoj estis fordonataj nur esceptokaze. De la malfekunda tero oni povis akiri laŭ deziro, sed ĝi nur por sekalo taŭgis.

Pakome tiam iris al komercisto kaj luis kelkajn bonegajn kampojn por unu jaro. Do tiam li povis semi tritikon kaj la rikolto sukcesis. Sed la tereno kuŝis tro fore de la vilaĝo : li devis iri dekkvin verstojn por atingi ĝin. Dume Pakome rimarkis, ke la komercistoj gajnas multan monon kaj konstruigas al si grandajn biendomojn kaj li pensis : „Se mi havus grandajn terposedaĵojn, ankaŭ mi gajnus multe kaj konstruigus al mi belan kampdomon.”

Tiel li ekpensis pri rimedoj, kiuj faros lin grandbienulon.

Kvin jarojn li laboris, ĉiam luante teron de la komercistoj. La rikolto estis plejofte bona kaj tial li povus vivi tre feliĉe, se lin ne ĉiam turmentus la zorgo pri la grundo luota. Kaj la ŝancoj por lui ĉiam pli maloftiĝis; ĉar aliaj venis pli frue ol li kaj tiam Pakome ne plu havis okazon.

* * *

Iutage komercisto rakontis al li pri la lando de la baŝkiroj. (= Mahometana gento, loĝanta en Orienta Rusio, de tartara deveno).

„Se oni nur bone harmonias kun la maljunaj baŝkiroj, tiam estas facile akiri malmultekostan teron. Mi donis al ili vestojn, tapiŝojn kaj keston da teo kaj per tio mi akiris kampojn je dudek rubloj por desjatino. La baŝkiroj estas tiom naivaj, ke ili fordonas la teron preskaŭ por nenio !”

Kaj Pakome meditis : „Kial mi estus tiom stulta, aĉeti ĉi tie por

mil rubloj kaj krome ŝuldigi min, se mi por la sama sumo povos akiri nemezureblajn kampojn ?”

Pakome detale informiĝis pri la vojo al la lando de la baŝkiroj. Kaj li vojaĝis kun unu servisto, konfidinte la domon kaj la korton al la edzino. Unue ili vizitis proksiman urbon por aĉeti tie, laŭ la konsilo de la komercisto, la necesan provizon da teo, vino kaj donacoj.

Tiel ili ekvojiras. Multajn tagojn ili marŝas kaj fine atingas en la sepa tago de sia vojaĝo iun vilaĝon, loĝatan de baŝkiroj. Ĉio montriĝas kiel la komercisto rakontis. La baŝkiroj loĝas en iu stepo ĉe la bordoj de malgranda rivero en tolaj tendoj. Ili estas migranta gento, ili ne kulturas la grundon, nek uzas panon; ili pasigas la tempon migrante tra la stepoj kun siaj ĉevaloj kaj brutaroj. Malantaŭ la tendoj staras la ĉevaloj ligitaj; dufoje ĉiutage ili ricevas la patrinan lakton.

El la lakto la virinoj faras „kumison” kaj fromaĝon. Trinki kumison kaj teon, manĝi ŝafaĵon kaj ludi fluton, jen ĉio, kion la baŝkiroj faras. Dikaj kaj grasaj ili estas, gajemaj kaj bruemaj kaj preskaŭ la tutan someron ili nur festadas; ili scias tre malmulte, komprenas neniun rusan vorton sed tre gastamaj ili estas.

Vidante Pakome 'n la baŝkiroj elvenis la tendojn kaj ĉirkaŭis lin. Feliĉe estis tradukisto en la tendaro; per li Pakome povis komprenigi sin kaj diri la celon de sia vojaĝo. La baŝkiroj akceptis lin en plej amika maniero, kondukis lin en la plej belan tendon, petis lin eksidi sur molan tapiŝon kaj kovris liajn piedojn per plumkusenoj; post tio ili prezentis al li teon kaj kumison kaj regalis lin per ŝafaĵo.

Pakome nun montras la donacojn, kiujn li kunportis, kaj disdonas ilin inter la baŝkiroj kaj la provizon da teo. Ili estas vere ravitaj, tuj ili ekbabilas inter si en sia lingvaĉo kaj ordonas al la interpretisto, ke li traduku iliajn parolojn.

„Ili ordonas min diri”, klarigas la interpretisto, „ke ili havas la plej afablajn sentojn por vi. Ili kutimas kiel eble plej bone akcepti fremdulojn kaj redoni ion por la ricevitaj donacoj. Ili do volonte scius, kion vi deziras.”

„Prefere mi ricevus iom da tero”, diras Pakome. „En mia regiono ni ne povas ricevi sufiĉe da kampoj kaj krom tio la tero, kiun ni posedas, estas ne tre fruktodona. Vi havas ĉi tie tre multajn kaj tre bonajn kampojn. Neniam en mia vivo mi vidis kampojn kompareblajn kun la viaj.”

La interpretisto ree tradukas kaj la baŝkiroj denove ekdiskutas. Pakome komprenas neniun vorton; ili gajiĝas, krias kaj ridas. Ili rigardas al Pakome kaj la tradukisto diras : „Ili donacos al vi pro via malavareco tiom da tero, kiom vi deziras. Vi nur montru, kion vi deziras, kaj ĝi estos via.”

Ree la baŝkiroj vigle ekdiskutis. „Kion ili nun asertas ?” demandis Pakome. „Kelkaj diras, ke oni antaŭe demandu la estron, kaj ne faru decidon sen lia konsento; aliaj asertas, ke lia interveno ne estas necesa”, klarigis la interpretisto.

* * *

Ankoraŭ ĉiam daŭris la diskutado, kiam alvenis viro portanta ĉapon el vulpofelo sur la kapo. Ĉiuj eksilentis kaj ekstaris. „Jen la hetmano”, diris la interpretisto.

Nun Pakome montras sian plej belan tapiŝon kaj prezentas ĝin kun kvinfunta pako da teo al la estro. Tiu ĉi akceptas la donacojn, eksidas sur la ĉeflokon kaj la baŝkiroj rakontas al li pri la celo de Pakome.

„Tre bone ! Ĉi tie estas tero superflua, montru la lokon kaj prenu tiom kiom vi deziras”.

„Nu, nu !” opiniis Pakome, „preni tiom, kiom mi deziras ? Sed pli bone, ke ni ĉion bone aranĝu; ĉar poste ili povus depreni, kion ili nun donas”.

Sekve li diris al la estro : „Mi dankas vin pro via grandanima propono : Vi posedas multan teron kaj mia deziro estas ne granda. Tamen mi volonte sciis, kiun parton vi volas cedi al mi kaj precize limigi ĝin kaj pritrakti tion laŭ la ordinaraj reguloj, ĉar ni ĉiuj estas mortemaj. Povus okazi, ke viaj infanoj volus forpreni de mi tion, kio estas de vi donacita”.

„Tre bone”, ride diris la estro. „Ni agos do en tio ĉi tute laŭ la regulo.”

„Mi aŭdis”, daŭrigas Pakome, „ke iu komercisto vin vizitis, al kiu vi donis terpecon. Vi skribe kontraktis kun li. Nu, ankaŭ kun mi vi faru tion”.

Nun la hetmano komprenis lian deziron. „Bonege”, li diris, „ni havas skribiston ĉi tie. Kune ni iros al la najbara urbo, tie ni faros kaj sigelos la kontrakton.”

„Volonte mi nun aŭdus pri la prezo”, diris Pakome.

„Ni havas ĉiam fiksitan prezon, ni postulas mil rublojn por unu tago.”

Pri tiu ĉi kalkulmaniero Pakome multe miris; li ne komprenis ĝin.

„Kiom da desjatinoj tio estas ?” li demandis.

„Tio estas ne antaŭe fiksebla. Ni vendas ĉiam je tiu sumo por unu tago. Ĉiuj kampoj, kiujn vi povos ĉirkaŭpromeni en unu tago, apartenos al vi. Kaj vi pagos mil rublojn.”

Pakome estis ekstreme mirigita.

„Oni povas tre grandan kampon ĉirkaŭpromeni en unu tago,” li diris.

„Pri tio ni estos kontentaj, sed kondiĉe „ke vi estos reveninta en la fino de la tago je la sama loko, kie vi komencis. Se vi ne estos reveninta, via mono estos perdiĝinta.”

„Kaj kiu metos la limfostojn ?” demandis Pakome.

„Nu, tion ni faros jene : vi mem elektos iun lokon por komenci. Ni restos tie kaj vi ekpromenos. Niaj junuloj akompanos vin rajde kaj ili metos limfostojn, tie, kie vi deziras. La limfostojn ni poste interligos per sulko. Vi povos ĉirkaŭpromeni kiom vi deziras, kondiĉe ke vi revenos antaŭ sunsubiro, en la lokon, de kiu vi foriris. La ĉirkaŭmarŝita tereno apartenos al vi.”

Tiu ĉi aranĝo tre allogis Pakome'n. La marŝo estis fiksata je la sekvonta tago.

Post tio ĉiuj ree komencis babili, tetrinki kaj manĝi ŝafviandon. Kaj fine ili donis al Pakome pluman liton kaj ĉiuj ekkuŝis.

* * *

Pakome agrable sin etendis sur la pluman liton, sed pro la daŭra pensado pri siaj planoj li ne povis fermi la okulojn.

„Mi tre bone negocis ĉi tie”, li pensas. „Nu, mi povos preskaŭ tutan landon proprigi al mi. En unu tago mi certe marŝos kvindek verstojn, ĉar la tagoj estas longaj nun. Kvindek verstoj... tio estos proksimume mil hektara surfaco. Kaj tiam mi estos mia propra mastro kaj dependos de neniu. Mi aĉetos bovojn por du plugiloj, mi dungos servistojn, kulturos la plej bonajn kampojn kaj paŝtigos miajn brutojn sur la ceteraj kampoj.”

Tiel meditante dum la tuta nokto, li ne povis kapti la dormon. Jam tagiĝis, kiam li por momento ekdormetis...

Tre frue en la mateno Pakome vekigis. Li ellitiĝas, vekas sian serviston, ordonas lin jungi la ĉevalojn kaj iras veki la baŝkirojn. Ili baldaŭ ekstaras kaj kolektiĝas; ankaŭ la estro ĉeestas. Oni alportas teon kaj kumison, kaj metas ĝin antaŭ Pakome'n. Sed li estas tro malpacienca.

„Estas tempo por foriri”, li diras. „Ni ekiru.”

Ĉiuj nun ekvojiras, kelkaj rajde, aliaj en veturiloj. Pakome veturas kun sia servisto kaj baldaŭ la stepo estas atingita.

Je la tagiĝo ili estas sur monteto. La baŝkiroj ekhaltas kaj la hetmano montras perfingre al Pakome la ĉirkaŭajn kampojn.

„La tuta tero videbla apartenas al ni. Elektu nun”.

La okuloj de Pakome ekbrilas. Kien ajn rigardante, ĉie li vidas belegajn kampojn, ebenajn kiel lia manplato.

La hetmano demetas sian vulpfelan ĉapon kaj metas ĝin sur la montosupron. „Ĝi estas la signo”, li diras. „Via servisto restos ĉi tie. Metu vian monon sub la ĉapon. De ĉi tie vi foriros kaj al ĉi tiu loko vi revenos”.

Pakome elpoŝigas sian monon kaj metas ĝin sub la ĉapon; li demetas sian mantelon, lasas nur la kaftanon kaj iom plifirmigas la zonon. Tiam li metas panon en malgrandan sakon, pendigas sur la ŝultron boteleton da akvo, suprentiras siajn botojn kaj estas preta por foriri. Momenton ankoraŭ li pripensas, en kiu direkto li ekmarŝos. Sed ĉie la tero aspektas fekunde kaj li pensas : „Fakte ne gravas, kien mi ekiras. Unue mi iros orienten”.

Nun li atendas la momenton de la sunleviĝo. La baŝkiroj estas pretaj por surĉevaliĝi kaj akompani. Jen la suno venas super la horizonton ! Pakome ekmarŝas tra la stepo, sekvate de la rajdantoj.

Li marŝas egalpaŝe, ne tro rapide, ankaŭ ne tro malrapide. Marŝinte unu verston, li ordonas meti limfoston kaj plue iras. Ĉar li sentas, ke liaj kruroj fariĝas malpli rigidaj, li plirapidigas siajn paŝojn; duan limfoston li lokigas. Rerigardante li vidas la monteton lumigatan de la matena suno, kaj ankoraŭ klare vidiĝas la baŝkiroj sur ĝi. Pakome taksas, ke li marŝis proksimume kvin verstojn. Li varmiĝas, demetas sian kaftanon, malgrandigas la zonon kaj daŭrigas la iradon. Tiel li marŝas ree kvin verstojn. La varmego fariĝas nun sentebla.

Observante la sunon li komprenas, ke fariĝas tempo por matenmanĝi. „Mi iris jam la kvaronan parton de mia promenado”, li pensas. „Sed havante ankoraŭ tri kvaronojn antaŭ mi, mi ankoraŭ ne bezonas reiri. Mi nur formetos miajn botojn”.

Tiel la marŝado estis pli oportuna.

„Ankoraŭ kvin verstojn, tiam mi maldekstren iros”, li pensas. „La grundo ĉi tie estas tro bela, por nun jam reiri. Ju pli mi progresas, des pli bona ĝi ŝajnas al mi. „ Tial li ankoraŭ rekten iris.

Fine li turnas la kapon : apenaŭ videbla estas la monteto kaj la baŝkiroj estas nur formikoj.

„Nun la tempo urĝas, ke mi ŝanĝu la direkton”, li pensas. „Mi havas nun sufiĉe.”

La ŝvito gutas de lia vizaĝo kaj promenantate li prenas gluton el sia botelo. Li daŭre iras tra alta, densa herbo kaj li sentas sin pro la ĉiam pli intensa varmo sufiĉe laca. Li ree rigardas la sunon, kaj rimarkas, ke estas tempo por manĝi.

Momenton li haltas, prenas panpecon el sia sako kaj starante formanĝas ĝin. „Ĉar se mi eksidus, mi povus ekdormeti”, li pensas.

Post kelkaj minutoj li daŭrigas. La manĝado lin refreŝigis, do komence li marŝas pli vigle. Sed ĉiam pli la varmego ĝenas kaj ankaŭ la dormemo. Li sentas sin tre laca.

„Nu”, li opinias, „unu horon da doloro, jarcenton da feliĉo !”

Ree li marŝas dek verstojn kaj ironte maldekstren li ekvidas belan valeton.

„Tiun valeton mi tamen ankaŭ volas posedi”, li pensas. „Kiom bone kreskos la lino en ĝi!” Kaj ree li rekten iras kaj ne turnas sin, antaŭ ol li ĉirkaŭiris la tutan valon.

Fine li direktas sin al la monteto. Pene li povas vidi la grupon da baŝkiroj; la distanco estas minimume dekkvin verstoj. Kaj li pensas : „Mi faris la unuajn distancojn tro grandaj. La trian mi faros iom malpli longa.’ Kun pli rapidaj paŝoj li komencis iri la trian flankon de sia teritorio.

Rapide la suno malleviĝis, kiam li ankoraŭ ne trairis du verstojn en la nova direkto, kaj Pakome kalkulis, ke li certe devos trapasi dek kvin verstojn antaŭ ol li estos ĉe la elirpunkto.

„Nun mi iru rekte al la monteto”, li pensas. Kaj tion li do faris.

* * *

Li estis morte laca, liaj piedoj, frotvunditaj, terure doloris kaj liaj genuoj tremis. Li deziris momenton ripozi, sed ne estis eble : li neniam atingus sian celon antaŭ sunsubiro. Kaj la suno ne atendis pro li : ĝi malleviĝis mirige rapide, preskaŭ falante kaj al Pakome ŝajnis, kvazaŭ iu ĝin malsuprenpuŝas.

„Ho ve !” li pensas, „mi ektimas, ke mi eraris. Mi faris la distancojn tro longaj. Kaj kion fari, se mi ne estos ĝustatempe je la celo ? Kiom malproksima ĝi estas kaj kiom laca mi sentas min ! Ho, se mi perdus miajn rublojn kaj la tuta peno estus por nenio ! Nu, mi streĉu miajn fortojn plej ekstreme !”

Kaj Pakome ekkuras. La piedoj sangas, sed li ne malakcelas sian iron. Li kuras, kuregas, sed ankoraŭ malproksima estas la celo ! Li forĵetas la kaftanon kaj la botelon, la ĉapon kaj la botojn.

„Ho ve !” li pensas, „mia avideco pereigos min. Mi ne atingos la celon antaŭ sunsubiro.” La timo preskaŭ sufokas lin. Li tute senspiriĝas. Kaj senhalte li kuradas; la buŝo estas sekega; liaj pantalono kaj ĉemizo gluiĝis pro la ŝvito sur la korpon. Lia brusto ĝemas kiel fajroblovilo, lia koro batas kiel martelo. La piedojn li ne plu sentas, liaj genuoj fleksiĝas, li estas svenonta. Pri la grundo li ne plu havas pensojn, lia tuta zorgo estas ne mortfali pro laciĝo. Pakome ektimas, ke li mortos : sed daŭre li kuras, pensante : „Jam marŝinte tian distancon, mi estus freneza, se mi nun rezignus.”

Li aŭdas la kriojn kaj la fajfadon de l'baŝkiroj, kaj tio eĉ pli instigas lin. Li kuradas kaj uzas la lastajn fortojn. Pli kaj pli li proksimiĝas. Jen estas la montelo, nun li povas distingi la homojn; ili signas per la mano, ke li rapidu. Jen la ĉapo, sub kiu kuŝas lia mono kaj la estron li vidas, kaŭrantan sur la tero.

„Al mi ne mankos la tero”, li diras enpense, „sed, ĉu Dio permesos al mi vivi sur ĝi ? Ho mi estas perdita !”

Ankoraŭ li kuradas. Li levas la okulojn al la suno; kiel granda, sangruĝa disko ĝi malleviĝas... jam ĝi tuŝas la teron... la malsupra rando estas jam sub la horizonto.. Fine Pakome estas ĉe la piedo de la moneto... sed ĝuste la suno malaperis.

Pakome eligas senesperan krion. Li imagas sin perdita. Sed subite li ekpensas, ke la suno estas ankoraŭ videbla por tiuj, kiuj staras sur la montopinto. Li suprenkuregas, ekvidas la ĉapon !

Venkinte ! Pakome faletas kaj ruliĝas sur la teron; sed falante li tuŝas permane la ĉapon.

„Brave ! mia knabo”, ekkrias la hetmano, „vi gajnis grandan terpecon.”

La servisto de Pakome alkuras por helpi sian mastron, sed li rimarkas, ke sango fluas el lia buŝo. Pakome mortis. Kaj la hetmano eksidas sur la teron kaj ridas tiom laŭte, ke li devas firmteni sian ventron. Poste li ekstaras, prenas fosilon kaj ĵetas ĝin al la servisto, dirante : „Vi fosu tombon por li.”

La baŝkiroj surĉevaliĝas kaj foriras, lasante la serviston kun la kadavro...

(Laŭ Tolstoj.)

VANE.

LI „PENSIS”.

„Pri kio vi pensas, kiam vi tutan tagon sidas fiŝante?”

„Tiam mi pensas, ho, ke fine fiŝo mordu la allogaĵon.”

„Kaj kion vi pensas, kiam iu fiŝo mordis?”

„Tiam mi pensas, aha!”

LA ĈARLATANO.

Iu famkonata kuracisto, jam delonge praktikante en Londono, iam iras sur la placo „Governar Squerre”. Li haltas, por atenti ĉarlatanon, kiu, en belega kvarĉevala kaleŝo kun pluraj belege vestitaj servistoj allogas multnombran popolamason kaj disdonas multajn medikamentojn. Informiĝinte pri lia loĝejo, la kuracisto petas al li viziti lin la sekvontan tagon.

La ĉarlatano faras tiel.

„Sinjoro”, diras al li la kuracisto, „Mi aŭdis vin hieraŭ publike anonci, ke vi havas taŭgajn kuracilojn kontraŭ ĉiaj malsanoj. Ĉu vi havas ankaŭ unu kontraŭ la scivolo? Atente rigardante vin, mi opiniis, ke mi konas vin, kaj mi ne povas rememori, kie ni vidis unu la alian.”

„Sinjoro, mi facile povas kontentigi vin. Mi servis plurajn jarojn ĉe Milord Waller, kiun vi ofte vizitis. Mi estis lia unua lakeo, kaj mi forlasis lin antaŭ tri jaroj por praktiki mian nunan metion.”

„Vi pli kaj pli incitas mian scivolemon. Kiel eblas, ke la talento, akirita de vi en tri jaroj havigis al vi la rimedojn por la luksa vivmaniero, en kiu vi ŝajne vivas? Mi jam plenumis mian profesion de post kvardek jaroj plej zorgeme, kaj mi povas diri, kun iom da fameco, kaj mi apenaŭ povas subteni mian simplan hejmaĵaron!”

„Sinjoro, por ke mi povu respondi rekte al via demando, ĉu vi permesas al mi fari kelkajn aliajn demandojn?”

„Volonte.”

„Vi loĝas sur unu el la plej movoplenaj stratoj de tiu ĉi urbo. Kiom da personoj pasas ĝin ĉiutage, laŭ vi?”

„Estus malfacile nombri ilin... Sed, ni diru: proksimume dek-mil.”

„Mi akceptu tiun kalkulaĵon kiel ĝusta. Kaj kiom el ili, laŭ vi, estas sagacaj personoj? Mi ne diras „spritaj” ĉar la mondo estas plenplena je ĉi lastaj.

„Ha, vi metas min en embarason, distingante la spritecon de la sagacecon, kaj, se estas cent el la lasta speco inter la dek-mil, estas jam multe.”

„Nu, sinjoro, vi mem respondis vian demandon! La cent saĝuloj estas viaj klientoj, kaj la naŭmil naŭcent aliaj estas miaj klientoj”.

(Francujo.)

El la franca lingvo trad. Yvonne BRUC.

Por komencantoj.

LA ŜOVEBLA FENESTRO.

Okazis dum la pasinta jaro. En la berna montaro. Grupo da turistoj tranoktis en montkabano, sur pajlo.

La sola ŝovebla fenestro estas malfermita. La, al ĝi plej proksime kuŝantoj baldaŭ plendas pri la eniranta malvarma aero. La fenestro do estas fermata. Regas nun plena silento — ĝis kiam la kuŝantoj en alia parto de la ĉambro protestas kontraŭ la fermo de la fenestro — ĉar ne estus eble spiri en tia sufokeca aero. Do oni ree malfermas la fenestron. Baldaŭ komenciĝas tumulto : tiuj, kiuj kuŝas apud la fenestro, frostas kaj klakas per la dentoj — ĝis oni denove fermas la fenestron. Pri kio, post kelkaj minutoj, la malantaŭa grupo koleriĝas pro la netolerebla varmego.

Tiel ili kveleris dum la tuta nokto.

Je la tagiĝo, iu konstatis, ke la fenestro tute ne havis vitron, nur estis la ligna kadro.

El : « La Semanto ».

Bazela Grupo.

TION SCIIS NUR JOĈJO.

„Patrino”, diras Joĉjo, „hodiaŭ la instruisto demandis ion al mi, kion neniu en la klaso sciis.”

„Kio tio estis, klera knabo mia ?”

„Nia telefon-numero, panjo !”

ĈE LA KURACISTO.

„Mi devas averti vin”, diris la kuracisto kun grava mieno, ke vi tre, tre malsanas. Ĉu eble estas iu, kiun vi ankoraŭ deziras vidi ?”

La malsanulo kapjesis.

„Kiu do ?” demandis la kuracisto.

„Alian kuraciston”, flustris la malsanulo.

HELPEMO.

Sinjinorino (al vagulo) : „Vi do estas senlabora ? Nu, mi scias laboron por vi ! Mi ĝuste intencas venigi viron, por haki lignon.”

Vagulo : „Bonege, sinjinorino. Diru nur, kie li loĝas. Mi tuj avertos lin.”

FLEGMO.

„Ĉu ĉi tie ne estas teatro ?” demandis la sinjoro, kiu devis trankvili en vilaĝo, kaj ĝismorte enuis.

„Ne”, respondis la gastejestro.

„Certe kinejo?”

„Ankaŭ ne.”

„Sed almenaŭ kafejo kun iom da muziko?”

„Ankaŭ ne.”

„Sed viro”, ekkriis la sinjoro. „Ne teatro, ne kinejo, ne muziko ! Kion vi do faras ĉi tie kiam pluvas ?”

„Nu, kion ni farus ?” diris la gastejestro flegme. Tiam ni lasas pluvi !”

KUNMETITAJ VORTOJ.

Instruisto : Esperanto estas tre praktika lingvo. El radikaj vortoj oni povas kunmeti novajn vortojn kun pli speciala signifo : benko en ĝardeno estas ĝardenbenko; karto kun bildo estas bildkarto; ŝuo el ligno estas lignoŝuo; tuko sur tablo estas tablotuko, kaj tiel plu. Ĉu vi ĉiuj komprenas ? Johano, bonvolu doni ekzemplon.

Johano : Libertempo, sinjoro.

Instruisto : Ha, ha, nun mi scias, pri kio vi pensas unue. Kaj vi, Petro ?

Petro : Akvosporto, sinjoro.

Instruisto : Tre bone. Vi sendube havas kanoton ! Kaj nun ankaŭ vi donu ekzemplon, Sibon !

Sibo : Horloĝo, sinjoro.

Instruisto : Sed « horloĝo » ne estas kunmetita, sed radika vorto, Sibon !

Sibo : Sed en **horloĝo** ja **loĝas** la **horoj**...

El : Ponto al la Praktiko (S. S. de Jong kaj W. Feenstra).

EN MARTO.

Estas printempo. Oni ne povas dubi : estas bela vetero; neniun nubon malhelpas la sunon sendi multajn radiojn al la tero; la homoj enspiras la sanigan aeron kaj demetas siajn varmigajn vestojn, ĉar jam estas varme; la birdoj kantas.

Eĉ la esperanto-instruisto nun estas kantema.

Instruisto : Ni kantu la unuan strofon de la himno anstataŭ studi la gramatikon.

Karlo : Kio estas „strofo”, sinjoro ?

Instruisto : Strofo estas grupo da versoj, kiun oni povas kanti laŭ melodio. Ĉe nova strofo oni rekomencas la melodion.

Sibo : Nun mi komprenas, kial mia patro diris, ke okazis katastrofo.

Instruisto : Ĉu okazis katastrofo, Sibbo ? Ĉu en Ameriko ?

Sibo : Ne, sinjoro, en nia ĝardeno hieraŭvespere, eĉ pli ol unu.

Instruisto : En via ĝardeno ? Mi ne komprenas.

Sibo : Mi mem aŭdis. Estis strofo kantata de kato; do estis katastrofo.

El „Ponto al la Praktiko”.

ER-AR-OJ.

Instruisto : Strange, Karlo, vi ĉiam faras erarojn, uzante la sufiksojn **er** kaj **ar**.

Karlo : Jes, sinjoro, per **er** kaj **ar** oni facile faras... erarojn, ĉar ili multe similas unu al la alia.

Instruisto : Nur laŭaspekte, ne laŭsignife, ĉar la signifoj estas absolute malaj. La sufikso **ar** kolektas, kunigas, kaj la sufikso **er** dividas, apartigas. **Ar** faras el apartaj objektoj kompletan tuton, kaj **er** faras el tuto amason da apartaj objektoj.

Kaj atentu, ke la vorto kun **ar** esprimas novan ideon : homaro ne estas grupo da homoj, sed ĉiuj homoj kiel tuto.

Karlo : Foje mi legis « aro da homoj ». Ĉu tio estas homaro ?

Instruisto : Ne, aro da homoj estas nur kelkaj homoj, nur grupo da homoj. Se via patrino konservas en skatoletto viajn unuajn dentojn, ŝi havas aron da dentoj, sed ne dentaron, ĉar dentaro estas dentoj, kiuj faras tuton. Tiel aro da vagonoj estas kelkaj apartaj vagonoj, sed vagonaro estas vagonoj, kiuj kune formas tuton, k.t.p.

La sufikso **er kontraŭe** ne donas alian ideon, sed nur indikas la plej malgrandan parton el la tuto. Sed la parto havas la samajn ecojn, kiajn jam havas la tuto : akvero estas guto de akvo kaj konservas la econ, la karakteron de la akvo.

Sibo : Sed sinjoro, se oni elpremas citronon, oni ekhavas **acidan sukron**, sed... **sukero** estas **dolĉa**.

El „Ponto al la Praktiko”.



INTERNACIA JUNULARKUNVENO

La Internacia Junularkunveno en Groet estis grandega sukceso. Entute partoprenis 203 gejunuloj kun gvidantoj el 9 landoj : Anglujo 77, Kimrujo 11, Aŭstralio 1, Polujo 2, Bulgarujo 2, Francujo 36, Belgujo 9, Ĉeĥoslovakujo 1, Nederlando 64. Pro manko de loko aperos vasta raporto pri la kunveno en la venonta numero. Por ke la legantoj havu ioman impreson pri la sukceso, ni enpresigas fragmentojn el leteroj, kiujn ni ricevis de entuziasmaj partoprenintoj. La plej bonan impreson havigos la filmo, kiu estis farata (vidu paĝon 31).

..Ne estas vortoj troveblaj por esprimi, kiel mi ĝuis la kunvenon. Vi havigis al mi la plej feliĉan semajnon de mia vivo...

F. M., Leerdam (Ned.).

...Mi ja ne povas sciigi al vi la tuton de mia animsento post tiu belega semajno. — Sed tre klare mi komprenas, ke la internacia junularkunveno devas okazi ĉiujare, por ke la tutmonda infanaro ĝuu la plej agrablan libertempon kiun povas doni la hodiaŭa mondo. Dum nia mallonga ĉeesto mi sentis min entute en Esperantujo. Ĉiuj estis tiel afablaj kaj bonkoraj, kaj kun ĉiuj mi povis paroli kaj ŝerci kiel en rondo de plej konataj parencoj.

Min kaptis la spirito de la lingvo internacia, kiel neniam antaŭe. Dum unu semajno mi vidis parteton de la estonta Esperantujo, kaj mi pli forte laboros por la fina venko...

J. W. H., Leighton Buzzard (Anglujo).

...Ni atingis nian landon post bonega vojaĝo kaj ĉiuj el ni estis tre feliĉaj kaj en bona sano. La knabinoj estis plenaj de entuziasmo kaj parolis jam fervore pri proksima jaro...

A. B. E., Bishop Auckland (Anglujo).

...Mi ne havas multe da tempo, ĉar vi scias, ke mi devas foriri, sed mi ne volas atendi mian rehejmiĝon ne skribante al vi en la nomo de ĉiuj mian dankemon pro la plezuro, kiun ni ĝuis dum tiu belega semajno. Ĉio okazis bone kaj ĉiuj estis feliĉaj. En ili restos ĉiam la memoro de tiuj tagoj, ĉar je tiu aĝo la impresoj estas kaj restas fortaj...

J. L. Somain (Francujo).

...Post nia alveno en Dover ni sidiĝis sur la marbordo kaj babiladis kun la knabinoj, kaj unu diris al mi tre ĉarme : „Esperanto estas belega lingvo — miriga lingvo — kien ni iros la sekvontan someron?” Tiam mi klopodis klarigi al ŝi, ke oni devas labori por Esperanto, ne nur ĝui ĝin. Sed mi povas certigi al vi almenaŭ unu rezulto estas, ke almenaŭ naŭ kimraj knabinoj nun fariĝis fervoraj esperantistoj !...

N. R., Seven Sisters (Kimrujo).

STATUTO DE LA TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO fondita la 16-an de aŭg. 1938 en GROET, Nordholando.

CELO.

T. J. O. celas :

- a. Propagandi la lingvon Esperanto inter la junularo de la tuta mondo.
- b. Faciligi la rilatojn inter la gejunuloj diversnaciaj per legado de komuna gazeto kaj korespondado en Esperanto.
- c. Aranĝi internaciajn kunvenojn por interkonatiĝo de la membraro.
- d. Havigi al la junularo indan vivocelon, nome interfratigi la homojn per Esperanto.
- e. Ĉiel akceli, ke Esperanto estu akceptata en la lernejoj.

MEMBROJ.

Membro povas esti ĉiu junul(in)o scipovanta Esperanton, havanta almenaŭ 14 jarojn kaj konsentanta pri la celo de T. J. O.

Membro subtenanta povas esti ĉiu plenaĝulo, scipovanta Esperanton kaj konsentanta pri la celo de T. J. O.

Membro aspiranta povas esti ĉiu junul(in)o nehavanta ankoraŭ 14 jarojn kaj scipovanta aŭ lernanta Esperanton.

ALIGO.

Oni aliĝas por la tuta jaro kaj pagas la jarkotizon kaj la abonon por la gazeto, „La Juna Vivo”, ĉe la aliĝo. La administra jaro iras de 1 julio ĝis 30 junio.

ESTRARO.

La estraro de T. J. O. konsistas el maksimume 9 personoj, nome prezidanto, sekretario, kasisto, redaktoro kaj 5 asesoroj, havantaj diversajn funkciojn. Ĉiu estrarano raportas antaŭ la 1-a de julio pri sia agado, por ke la komuna gazeto enhavu sciigojn antaŭ la ĉiujara internacia kunveno. Tiu ĉi kunveno decidas pri restado aŭ foriĝo de estraranoj.

PROPONOJ.

Ĉiu membro aŭ membro subtenanta povas sendi proponojn en la intereso de T. J. O.

PERANTOJ.

En ĉiu lando T. J. O. havas ĉefperant(in)on kaj en ĉiu loko perant(in)on. La geperantoj plenumas la organizajn taskojn de T. J. O.

KONTROLO.

La ĉiujara Internacia Kunveno elektas kontrolkomitaton, kiu kontrolas la havaĵojn de T. J. O. kaj raportas antaŭ la -1-a de julio.

KUNVENOJ.

Ĉiujare okazas la Internacia Kunveno, kiu havu festan kaj propagandan karakteron. Dum la Ĉ. I. K. okazas laborkunsido por aranĝi organizajn demandojn.

Regionaj kunvenoj okazas laŭ decido de geperantoj.

EKSIĜO.

Oni ekŝiĝas el T. J. O. per skriba anonco ĉe la sekretario kaj je la fino de la administrata jaro.

ESTRARO de T. J. O. :

Prezidanto : S.ro P. Krijt, Veeteeltstraat 156, Amsterdam.

Sekretario : S.ro F. Meydam, Lingestraat 11, Leerdam.

Kasisto : S.ro M. v. d. Horst, Johan Idastr. 32, Rotterdam, girono 330139.

S.ro Schut, Instruisto, Koedijk (N.H.) (filmservo).

S.ino E. van Veenendaal-Bouwes, West-Graftdijk (N. H.), redaktorino „La Juna Vivo”.

S.ro W. Bant. Instruisto, Groet (Gem. Schoorl, N. H.).

F.ino Jekke van Dijk, Rauwerd (Fr.).

KOTIZO :

La jarkotizo, inkluzive „La Juna Vivo”, estas 1 guld., por ĉiuj membroj.

FILMO :

S.ro Schut faris tre belan, 8-milimetran, moviĝantan filmon pri la kunveno, kiu donas bonegan impreson pri la festo. La daŭro estas proksimume 50 minutoj. Ĉi tiu filmo certe estos unu el la plej belaj propagandiloj por Esperanto. Por informoj rilate prezentadon, luprezon, ktp. oni turnu sin al : S.ro Schut, Instruisto, Koedijk (N.H.), Nederlando.

LA ĈEMIZO DE LA FELIĈULO.

(Teatraĵo prezentita de la infanoj el Birmingham dum „La Internacia Kunveno” en Groet.)

Personoj :

Reĝino	2 soldatoj	Edzino de la riĉulo
Reĝo	D.ro Gajo	Sciencisto
Ĉefministro	D.ro Saĝo	Feliĉulo.
3 korteganoj	Riĉulo	

UNUA AKTO.

(Palaco. 2 soldatoj staras ĉe la pordo. Korteganoj staras kaj parolas.)

Unua soldato : Mi petas silentu ! La reĝo venas ! (Eniras la reĝo, reĝino, ĉefministro. Ĉiuj klinas sin).

Ĉefministro : Via reĝa Moŝto, mi prezentas al vi la dokumentojn, kaj mi petas ke vi legu kaj subskribu ilin. Estas la afero de la...

Reĝo : Silentu ! Mi ne subskribos ilin, kaj mi ne legos ilin !

Ĉefministro : Via reĝa Moŝto ! Estas grave. Kiel via ĉefministro mi petas ke...

Reĝo : Idioto ! Tio sufiĉas. Vi ĉiam babilas pri dokumentoj ! Ili ne interesas min. Mi estas malsana. Ĉu vi ne scias, ke mi estas tre malsana. Stultulo ! Foriru, vi kaj viaj dokumentoj ! (La ĉefministro foriras).

Reĝino : Mia kara, ĉu vi estas malsana ? Ĉu vere ? Mi kredis, ke vi estas multe pli sana hodiaŭ.

Reĝo : Tute ne. Mi certe ne estas pli sana. Mi estas multe pli malsana. Sed vi ne komprenas min. Vi estas kiel la aliaj. Mi ne restos kun vi. Mi foriros ! (Foriras kolere.)

Reĝino : Ho li estas kolera. Kion fari ? (Ploras kaj foriras.)

1-a kortegano : Mi ne komprenas la reĝon. Li aspektas en bona stato.

2-a kortegano : Li bone matenmanĝis !

3-a kortegano : Jes, li manĝis kvar ovojn, tri pecojn da lardo, kaj ses pecojn da rostita pano. Ankaŭ oranĝmarmeladon kaj du pomojn.

1-a kortegano : Li profunde dormis ĉinokte.

2-a kortegano : Jes, li ronkis ! Mi aŭdis lin.

1-a kortegano : Mi ankaŭ.

3-a kortegano : Jes, kaj mi.

2-a kortegano : La kuracistoj diras, ke li ne estas malsana.

3-a kortegano : Mi tute ne kredas, ke li estas malsana.

1-a kaj 2-a korteganoj : Ŝ ! (Eniras du kuracistoj.)

D.ro Gajo : Pardonu. Kie estas Lia Reĝa Moŝto ? Li vokis nin. Ni estas la novaj kuracistoj. D.ro Saĝo kaj D.ro Gajo.

1-a kortegano : Mi petas atendu momenton. Ni informos lin ! (Foriras.)

D.ro Gajo : Nu, mia amiko, ĉu vi kredas, ke vi povos resanigi lin ?

D.ro Saĝo : Certe jes. Mi legis multe, multe da libroj !

D.ro Gajo : Hm, jes, vi aspektas tiel. Mi ne multe legas, sed mi rigardas. Mi rigardas la homojn.

1-a soldato : Lia Moŝto ! (**Ĉiuj eniras. La gereĝoj sidiĝas.**)

Reĝo : Nu, D.ro Saĝo, komencu.

D.ro Saĝo : Permesu, ke mi vidu vian langon. Dankon. Ĝi estas roza. Vian pulson. Tute normala! Nun mi ekzamenos viajn pulmojn. Bonaj ankaŭ! Via Moŝto, laŭ mia ekzameno vi estas absolute sana.

Reĝo : Idioto ! Kiel vi kuraĝas diri tion ? Soldatoj, forprenu lin ! Metu lin en malliberejon kaj donu al li nur panon kaj akvon ĝis kiam li estos pli saĝa. Nu, kiu estas vi ?

D.ro Gajo : Mia nomo estas D.ro Gajo, Via Moŝto.

Reĝo : Ho vere, kaj ĉu vi ankaŭ intencas diri, ke mi estas sana ?

D.ro Gajo : Certe ne, Via Moŝto !

Reĝo : Do vi povas ekzameni min.

D.ro Gajo : Mi ne deziras fari tion, Via Moŝto. Mi tuj diros al vi, kiel vi povos resaniĝi. Trovu homon, kiu estas absolute feliĉa. Pruntu lian ĉemizon kaj dormu en ĝi unu nokton. Tiam vi estos sana !

Ĉiuj : Kiel stranga afero ! Kurioza. Eksterordinara !

Reĝo : Trovu feliĉan homon kaj pruntu lian ĉemizon. Bone ! Tio estas facila. Mia popolo estas tre feliĉa. (**Al la korteganoj.**) Ĉu vi aŭdas, vi ? Mi deziras havi la ĉemizon de feliĉulo. Alportu la ĉevalojn ! Rajdu ĉien ! Petu al ĉiuj, junaj, maljunaj, riĉaj, malriĉaj ! Kiam vi trovas feliĉan homon, sendu lin al mi ! Rapidu !

DUA AKTO.

(Domo de riĉulo. Eniras 1-a kortegano, ĉirkaŭrigardante.)

1-a kortegano : Hm ! Bela domo ! Mi estas bonŝanca. Ili certe estas feliĉaj ĉi tie. Tre riĉaj ili estas ! (**Eniras Riĉulo.**)

Riĉulo : Bonan tagon. Pardonu, ke mi atendigis vin, sed mi estas tre okupata. Mi petas, sidiĝu.

1-a kortegano : Dankon. Belan domon vi havas, sinjoro.

Riĉulo : Hm, ne malbona. Sed, ĝi estas tro proksima al la urbo.

1-a kortegano : Jes eble, kaj ĉarman ĝardenon mi vidis, kiam mi alvenis.

Riĉulo : La ĝardeno ? Ho jes, sed mi ne havas tempon por iri en ĝi.

1-a kortegano : Via fabriko bone sukcesas. Vi certe gajnas multe da profito, ĉu ne ? Oni diras, ke vi estas tre riĉa.

Riĉulo : Riĉa ? Jes, mi estas riĉa, sed mia mono enuigas min. Ĉiuj deziras mian monon. Rigardu la leterojn ! Dekmil leterojn mi ricevis pasintan jaron de personoj, kiuj petas monon de mi. Ba !

1-a kortegano : Sed vi estas kontenta, ĉu ne, ke vi povas helpi aliajn personojn ?

Riĉulo : Helpi ? Ho ne, dankon. Mi ne donos unu pencon ! Ne unu pencon ! La homoj ne estas honestaj. Mi donis monon al personoj kiuj estas malhonestaj. Mi ne donos plu. Mi ne fidus ilin. Ili estas ŝtelistoj.

1-a kortegano : Do vi ne estas feliĉa, ĉar vi estas riĉa ?

Riĉulo : Feliĉa ? Ba ! (**Eniras la edzino de la riĉulo.**) Sed jen mia edzino, permesu, ke mi prezentu vin al ŝi. Nun mi foriros. Mi ne havas tempon por resti. (**Foriras.**)

Edzino : Do, sinjoro, vi venas el la palaco ?

1-a kortegano : Jes, kaj mi admiras vian domon. Kiel bela ĝi estas.

Edzino : Ho, ne ! Terura domaĉo ĝi estas ! Mi malŝatas ĝin. Kaj ne restas longe en ĝi.

1-a kortegano : Ĉu vi multe vojaĝas ?

Edzino : Certe jes. Mi vizitis multe da landoj kaj da famaj urboj. Mi estis en Parizo, Romo, Amsterdamo, Londono, Nov Jorko kaj — ho, mi forgesis la nomojn !

1-a kortegano : Kiel bonŝanca vi estas !

Edzino : Tute ne ! Mi ne ŝatas vojaĝi. La fremdaj landoj ne interesas min. Mi ne komprenas la fremdajn lingvojn, kaj mi certe ne intencas lerni ilin. Krome mi estas ĉiam malsana sur la maro.

1-a kortegano : Do, kio interesas vin ?

Edzino : Nenio interesas min. Mi havas ĉion. Ne restas plezuro, kiun mi ne spertis. La vivo absolute enuigas min.

1-a kortegano : Do vi ne estas feliĉa ? Nun, mi forlasos vin, sinjorino, kaj mi diras adiaŭ. **(Al si mem.)** : Ne la riĉuloj certe ne estas feliĉaj.

TRIA AKTO.

(Ĉambro de sciencisto. La 2-a kortegano sidas, la sciencisto staras.)

Sciencisto : Kaj jen la planoj de mia lasta maŝino. Aeroplano. Rapidege ĝi iras. Rigardu.

2-a kortegano : Jes, vi estas la plej bona sciencisto el la lando. Fama vi estas. Vi estas feliĉa, ĉu ne ?

Sciencisto : Mia amiko, ne. Mi neniam inventos alian maŝinon. Mi estas la plej malfeliĉa homo en la lando.

2-a kortegano : Sed kial ? Vi bone sukcesis. Via nomo estas mondfama.

Sciencisto : Mi sukcesis fari malbonon. Vidu miajn aeroplanojn. Kion la homoj faras per ili ? Ili faras militon. Ili detruas urbojn, ili ĵetas bombojn, ili kaŭzas fajrojn. Estas milito en la aero per miaj maŝinoj. Mi intencis inventi bonan maŝinon, sed la homoj misuzas ĝin. Ho, malfeliĉa mi estas.

KVARA AKTO.

(En la kamparo. La feliĉulo ĝoje ludas fluton. Poste li eksidas, manĝas, fajfas, trinkas akvon el rivereto. La 3-a kortegano rigardas, malantaŭ arbo.)

Feliĉulo : Ha, freŝa akvo. Bonŝanca mi estas. Kaj kiel varma suno ! Mi kuŝos tie ĉi sur la herbo apud la belaj floroj, kaj dormos sub la suno. **(La 3-a kortegano alproksimiĝas.)**

Feliĉulo : Ho, saluton amiko.

3-a kortegano : Saluton, sinjoro. Pardonu, mi petas, sed mi promenis longe kaj mi estas malsata. Sed mi vidas, ke vi ne havas manĝaĵon.

Feliĉulo : Ho jes, mi havas, en mia sako. Estas pano kaj pomo. Mi intencis havi ilin por la temanĝo, sed prenu, mi petas.

3-a kortegano : Dankon, vi estas tre afabla.

ENIGMOJ

Ŝtupenigmo.

.. X ..	1. striita besto.
.. X ..	2. knaba vestaĵo.
.. X ..	3. mezurunuo por fluidaĵo.
.. X ..	4. refreŝiga nutraĵo.
.. X ..	5. koloro.
.. X ..	6. raba besto.

La mezaj literoj, legitaj de supre malsupren, formas la nomon de nutraĵo, farita el lakto.

Hilversum (Ned.) G. FRANSEN Jr.

(La tuto konsistas el 21 literoj (6 vortoj) kaj signifas proverbon, esperantigita de Zamenhof. 1, 9, 15, 17, 21 arba ŝelo, uzata por fari ŝtopilojn.

6, 3, 4, 10, 16 rapide sin levi de la tero kaj refali teren.

20, 2, 5, 8 adverbo pri tempo.

7, 13, 12, 6, 10, 14 kiu facile etendiĝas kaj reprenas sian antaŭan formon.

19, 11, 20, 18 ripoza meblo.

Soissons (Franc.).

J. BOURNICHE.

Inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos du premiojn. Solvojn ni akceptos ĝis 15 Oktobro.

LA SOLVOJ EL No 12.

l e t e r o
e t e r o
t e r o
e r o
r o
o

2. Loko — koro — rozo — zono — novembro — broso — solo.

La premiojn gajnis : Mad. Ménot, Oréans (Franc.);
G. Svendsson, Stokholm (Sed.).



SKRIBA KURSO DE LA JUNA VIVO

„LA JUNA VIVO“-skriba komenckurso (nur por holandlingvanoj). 16 lecionoj, lernolibreto kaj vortareto. Prezo 0,95 guld. Senpaga korektado.

„LA JUNA VIVO“-daŭrigkurso, preparante por diplomo A. 25 lecionoj, legolibro, historilibreto kaj amaso da buŝaj ekzamendemandoj. Prezo : guld. 1,90. Senpaga korektado.

(Sen korektado oni pagas por ambaŭ kursoj nur la duonan prezon.)



RICE TA

SKIZO DE EKONOMIA GEOGRAFIO, verkita de J. F. Horrabin, elangligis B. Ross. Formato 14 × 20 cm., 134 paĝoj. 45 entekstaj kartoskizoj kun esperantigitaj nomoj. Eld. S.A.T. Prezo 20 fr. fr.

PETRO KROPOTKIN : AL LA JUNULOJ! KAJ BIOGRAFIO. Traduko de fama, profunde etika broŝuro, kune kun biografio pri la vivo de la anarkista pensulo. Formato 12 × 18 cm., 54 paĝoj. Prezo 6 fr. fr.

VOLENDAM. 6-paĝa, riĉe ilustrita broŝuro pri la tipa, famkonata nederlanda vilaĝo. Eld. La Unuiĝo por fremdultrafiko en Volendam. La broŝuro estas senpage havebla ĉe S.ro H. L. Hartog, Kathammerstraat 68, Volendam. La estraro de la Esp. klubo „Volendam Viva” urĝe petas ĉiujn mendi la libreton, ĉar nur kun granda peno ili akiris la broŝuron. Do ĉiu petu unu senpagan ekzempleron!

HAAPSALU EN ESTONIO, sanigŝlima kaj mara kuraĉloko. 26-paĝa, ilustrita prospekto, k. karto pri la urbo. Eld. Haapsalu's Esp. Societo „Radio”. La broŝuro estas senpage mendebla al : Haapsalu Linnavalitsus, Kooi str. 2, Haapsalu, Estonio.

LEJDENO, la instruadurbo apud maro kaj lagoj, apud arbaro kaj dunoj. Tre bela, riĉe ilustrita faldprospekto. Eld. Unuiĝo por Fremdultrafiko en Lejdeno. Pli detalajn komunikojn estos volonte senpage donataj. Adr. Oficejo V. V.V., Stationsweg, Leiden, Nederlando.

LA MAJSTRO PAROLAS. Petro Danov. 153-paĝa broŝurita libro. Eld. „Frateco”, Sevlievo Bulgarujo. Prezo 25 bulg. lev. (4 resp. kup.).

M. E. B. Serio, No. 16; **Rozinjo**, Gyloa Török, el la hungara lingvo trad. K. Kallocksay : 17. **El la Londona Skizlibro**. Charles Dickens, el la angla lingvo trad. Fr. Wadham : 18. **Flugado Alimondon**, originale verkis Ernest Dodge. Prezo po 35 cendoj.



KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO

En „Lingua Axiliar” (red.ino Maria Ieda de Moraes, Rio de Janeiro, Brazilo), aperis la 6-a kaj la 7-a lecionoj el la Internacia Lernolibreto „La Juna Vivo”.

Subtenu la Tutmondan Junularlaboron !

KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en la jaro senpagan korespondadreson ne pli grandan ol du linioj.

Germanujo : Eksterlandaj ges.anoj ! Pensu pri la s.anoj, al kiuj ne eblas aktive labori por nia ideo. Des pli Vi prenu ĉiun okazon por lingva perfektigo kaj propagando. El Esperantano fariĝu Esperantisto ! Subtenu la organizojn. Germana amiko.

Danujo : 21-jara pentristo dez. kor. kun geesperantistoj en ĉiuj landoj. Respondo certa. Oskar Grove, Durup St.

Francujo : Marie-Thérèse Huart, rue de Lille, Marchiennes (Nord), 10-jara, dez. kor. kun samaĝaj knabinoj en ĉiuj landoj.

Francujo : K.do Konkuriak L., 100 avenue du 20c Coys, Nancy, dez. kor. nur poŝtkarte.

Francujo : S.ro Roger Crépin, à Blessy, par Aire s/Lys, Pas-de-Calais, deziras korespondi.

Francujo : F.ino Claire Dupuis (18-jara), 35 rue de l'Abreuvoir, Valenciennes, dez. kor.

Francujo : M. Yves Vignon, Chemin du Détour, Mississipi, Pas-de-Calais, dez. kor.

Francujo : K.do G. Murlon, 76, Rue Charles Keller, Nancy (M. M.), dez. kor. per poŝtk., leteroj, kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj.

Hungarujo : 17-jara katolika gimnaziano dez. kor. kaj interŝ. p.m. k. ĉ. l. S.ro Lajos Márton, Bány a-u. Budapest X.

Nederlando : S.ro F. W. H. Rasink dez. kor. per leteroj kaj ilustritaj poŝtkartoj kun ĉiuj landoj. Leuvenstraat 23, Leiden.

Nederlando : K. E. K. Esperanto-kurso nepre bezonas korespondantojn por komencantoj. Resp. certa. S.ro J. Quispel Jzn., Dennendaal 61, Rotterdam-Z.

Nederlando : F.ino Tr. Bloem, 18 jara, dez. kor. kun ĉiuj landoj Adr. O. Knollendam (N. H.).

Nederlando : S.ro K. Vader, Schagerbrug. Gem. Zype (N. H.), dez. kor. kun ges.roj en la tuta mondo.

Usono : Junuloj dez. kor. kun la tuta mondo. H. S. Boyd, 315 Melrose Avenue, Toronto, Kanada.

ANONCETOJ.

SKRIBA KURSO POR A kaj B (nur por holandlingvanoj). Tre detala B-kurso. Gvidanto S. Aarse. Petu senpagan prospekton. Ĉiu kandidato sukcesis. „La Verda Stelo”, Scheldestraat 64, Amsterdam-Z.

MUUSES ESPERANTO-BIBLIOTEKO. Libretoj 32-36 paĝoj po 0,35 guld. Serio 10 volumetoj 2,50 guld. La enhavo interesa, instrua, bonstila, speciale taŭga por daŭriga kurso. Kursgvidantoj rajtas peti specimemon. Mendebila al „La Juna Vivo”.

SILKA LEGOSIGNO, kun enteksita portreto de nia Majstro. Bele, bone prizorgita portretigo de D-ro Zamenhof, kies vizaĝo kaj subskribo aperas klare sur la blanka fono. Dimensioj 15 × 5 cm. Prezo : belg. fr. 5 (guld. 0,30) plus afranko. Mendebila al „La Juna Vivo”.

INTERNACIA KANTARO „LA JUNA VIVO”. 34 kantoj kun muziknotoj. Prezo 0,35 guld. Mendante plurajn ekz. oni ricevas rabaton. Tre taŭga por grupvesperoj kaj ekskursoj.

LEGAJO POR ĈIU ESPERANTISTO troviĝas en „La Juna Vivo”. Por 0,20 guld. (2 resp. kup.) oni ricevis 10 malnovajn numerojn. Laŭ plaĉe samajn aŭ diversajn.

SEPTEMBRO-FESTO, Flandrema Grupo Esperantista, je la 17-a de Septembro, vespere, en „De Ton”, Pelikaanstraat, 10, Antverpeno. (Alloga programo; kantado, teatraĵo, ĝazbando, balo.)

LIGKUNVENO (Flandra Ligo Esperantista), je la 18-a de Septembro en la ejo de Flandrema Grupo Esperantista, „Nieuwe Carnot”, Carnotstraat, 10, Antverpeno.

Informojn pri la septembro-festo donas la sekretario : J. de Ridder, Draakstraat 22, Antverpeno, Belgujo.

REZULTO DE LA LOTUMADO INTER FRUPAGINTOJ.

F.ino v. Emmerich (Arnhem, Ned.) : 3-a jarkolekto „L.J.V.”; S.ro Nederland (Kalundborg, Danujo) : Int. lernolibreto; Esp. Societo en Bern (Svisujo) : 1-a jarkolekto „L.J.V.”; S.ro W. Dik, (Nieuwe Schans, Nederlando) : Krestomatio; F.ino J. Hotsma (Leeuwarden, Ned.) : Bind. jark. „Niaj Vizaĝoj”; F.ino Plas (Middelie, Ned.) : Kantaro „L.J.V.”; S.ro G. de Kruyff (Franeker, Ned.) : Bapto e Savica; S.ro H. Althof (Franeker, Ned.) : 2-a jark. „L.J.V.”; F.ino J. Schijff (Heemstede, Ned.) : La Trezoro de la Orajisto; S.ro C. Heyblok (Julianadorp, Ned.) : Facila Legolibro; S.ro K. Sarganek (Poruba U Orlové, Ĉeĉosl.) : Kantaro „L.J.V.”; S.ro Boonacker (Schermerhorn, Ned.) : Kantas la Hungara Skolto; G. Blakborn (Middelie, Ned.) : Kantaro „L.J.V.”; S.ro P. Nambride (Amecy, Francujo) : Flirto Esperanta; S.ro E. v. Walsum (Alblasserdam, Ned.) : Kantaro „L.J.V.”; F.ino J. Streefland (Leiden, Ned.) : Ilustrita Lernolibro de Esperanto; S.ro Lebecque (Neuville, Francujo) : Lernolibreto „L.J.V.”; S.ro F. Meydam (Leerdam, Ned.) : Fabeloj de Andersen.